EKO 2025

Power - la potenco de unu vivo

EKO 2025-49. Dec 28. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## Charles Power en la memoro

Finfine la Fonduso Charles Power estas preskaŭ fondita: mi sendadis la monon al Martin, li faris projekton de la regularo kiu atendas la aprobon de la estraro .Sed dume la aferoj progresis. Jen kio okazas:

1. **Scienca agado**: dank' al Amri, kiu ĝisdatigis la regularon de AIS kaj IKU la unuaj Premioj Power pri longa scienca prelego, resp. sume de €300/200/100; kaj mallonga scienca prelego de €300/200/100 estis aljuĝitaj. Krome mi sendis monon por pligrandigi la sumon de la Premio Pirlot. Mi intencas daŭrigi la saman enkadre de la Fonduso.
2. **Kultura agado**: la ideo estas starigi novan subbranĉon "Sciensfikcio kaj fantasto" en la branĉo "Prozo" - mi diskutis kun Miguel; denove tri niveloj laj la regularo de la Belartaj Konkursoj (€260/182/104). Aldone mono povus esti uzata kovri elspezojn por reklami, eldoni ktp laŭ la bezonoj de la kultura agado.:a subbrancho estas inkluzivita en la alvoko de la BK. Mi faris similajn donacojn al ESF kaj Esperanto-UEA. Ili prilaboris regularon lau niaj konversacioj. Tie la mono subvencias kino-festivalon, eldonon de originalajn sciencfikciajn librojn au tradukojn, lingvistikaj projektoj de ESF ktp.

Mi pensas, ke mi uzis la monon de la vivasekuro de Karlo por subteni la Esperanton movadon kiel li meritas! Dum mi vivas mi intencas aldoni monon je pli malgrandaj kvantoj por teni la fondusojn vivantaj. Mi aliĝis al la UK en Graz kaj esperas revidi vin!

Daniela Power

## Belartaj Konkursoj de UEA agnoskas scienc-fikcion

BK-2026, ni enkondukas la subbranĉon “Sciencfikcio kaj Fantasto”, kies unua premio havas la nomon “Premio Charles Power”, omaĝe al la samnoma iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, verkisto, tradukisto kaj ŝatanto de scienco kaj sciencfikcio, kiu forpasis en aprilo 2025.

## Nepala festado

Okazis la 166-a Zamenhofa Tago en Katmanduo kun la partopreno de 37 membroj. Dum la programo parolis gesinjoroj Philip Pierce, Indu Devi Thapaliya, Shrijana Joshi, Nabin Lal Shrestha, L. P. Agnihotri kaj Sabita Dahal pri Esperanto kaj la vivo de D-ro L. L. Zamenhof. Unuminuta silentado estis observata omaĝe al la Esperantistoj forpasintaj dum la pasinta jaro. Krome, ĉi-jare forpasis tre aktivaj kaj gravaj Esperantistoj — Renato, Roman kaj Rob kies foriro estas granda perdo por la evoluo de la lingvo
.

## UEA invitas prelegi en UK en Graco (Graz)

La konata astrofizikisto Amri Wandel, ĉefa motoro de la scienca agado de UEA, komunikis al la Estraro de UEA sian decidon rezigni pri sekretariado de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) – tamen li restos membro de la IKU-komisiono. La nova estraro transdonis tiun taskon al José Antonio Vergara, iama estrarano pri scienca kaj faka agado. Ĉilia medicinisto, li membras en la IKU-komisiono kaj prelegis kelkfoje.

## Senlace okazadas la koreaj kursoj



En la 27-a de nov. 2025, tri novaj esperantistoj (S-inoj Iluma, Sofia kaj S-ro Davido) naskiĝis tra la 382-a klaso de Seula Esperanto-Kulturcentro Ili partoprenos en la Transjara Kurskunveno de Esperanto, kiu okazos jarfine en Kameoka, ĉefa sidejo de Oomoto, Japanio. Mi esperas, ke ili daŭrigos la lernadon de Esperanto post elementa kurso. (fotita de Sunera Son)

## Oni kongresas en brazila ĉef-urbo, Braziljo



## Pluiri kaj kuiri per la Kuriero en via kuirejo

«Diru al mi, kion vi manĝas, kaj mi diros al vi, kiu vi estas. Kuirarto parolas pri ni, pri niaj emocioj, niaj plezuroj kaj niaj revoj. En siaj Analektoj<, Konfuceo rimarkigas nin pri tio, ke "oni neniam satiĝas je bongusta kaj delikata manĝaĵo." Kelkajn jarcentojn poste, la filozofo Gaston Bachelard asertis, ke "manĝado estas (…) festeno por la sensoj". Kuirarto estas invito al vera ĉirkaŭmonda rondvojaĝo, do ĉetabliĝu! La vespermanĝo estas preta», – skribis Agnès Bardon, ĉefredaktoro de "Unesko-Kuriero", en la ĉefartikolo de la dua ĉi-jara kajero de ĉi tiu gazeto (aprilo-junio).

"Manĝaĵoj: kio kunigas nin" estas la ĉefa temo de la dua ĉi-jara kajero de "Unesko-Kuriero", aperinta en la retejo de Unesko kun kelkmonata malfruo; legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/unesko-43/ kaj elŝutu ĉi tiun bongustan "Kurieron".

La 79-a IKU-sesio okazos kadre de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graco, Aŭstrio!  UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiujn oni sendu al la IKU-sekretario retpoŝte per iku@uea.org plej laste la 31-an de januaro 2026 ⏰

AAkceptita IKU-prelego, IKU-AIS-kurso aŭ SK-prelego estos rekompencita per honorario!

📎Pli detalaj informoj: 👉**uea.org/gk/1260**

**#Esperanto #UKEsperanto #UK2026**

## Konferenco de la Akademio de Esperanto

**La 15-an de decembro, okaze de la Zamenhof-festo, okazos la kvina Konferenco de la Akademio de Esperanto, spektebla en la reto per zoom. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/akademio-33/ kaj spektu la konferencon.**

## Kulture pri Togolando

***Togolando kulture* estas la titolo de la nova riĉe ilustrita libro de Kokou SAGBADJELOU, emerita ŝtata instruisto kaj eminenta togolanda esperantisto. Kun amplekso de 34 paĝoj – tralegebla maksimume du horojn – la libro prezentas, krom rakontojn en kiuj rolludas bestoj, proverbojn, enigmojn, regulojn Kmarborda regiono de Togolando.**

Adje Adjévi

## Litovaj informoj

La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas en decembro havis tri gravajn renkontiĝojn, ligitajn kun la invito okazigi en 2028 la 113-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kaŭno, interalie, kun la prezidanto de la Litovia parlamento Juozas Olekas.  Legu prian artikolon en "La Ondo de Esperanto" ĉe https://sezonoj.ru/2025/12/litovio-83/

**Forpasis** Angelė STRALECKIENĖ (1940 - 2025)

Litova Esperanto-Asocio informas, ke la 27-an de novembro, 2025 en Marijampolė en sia 86-a vivojaro forpasis aktiva esperantistino Angelė STRALECKIENĖ. Ŝi ekestis esperantistino en 1989. Angelė partoprenis multajn BET-ojn, kelkajn Universalajn kongresojn de Esperanto en diversaj landoj, aliajn internaciajn esperantistajn aranĝojn. Dum 11 jaroj gvidis Eo-klubon *Alfabeto* en Marijampolė, gvidis multajn Eo-kursojn, verkis artikolojn pri Esperanto por litova gazetaro

Povilas JEGOROVAS. Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

/

## Benina bedaŭro

La benina esperantisto kaj fakdelegito de UEA Codjo Benoît Zinkpe forpasis la 13-an de decembro 2025 en la aĝo de 59 jaro,. Benoît estis ledaĵisto, metiisto kun granda lerteco kaj dediĉo al sia laboro. Krom tio, li servis kiel oficisto en la Afrika Oficejo de UEA en Lokossa (Benino), kie li kontribuis al la administraj kaj organizaj taskoj kun sindediĉo. Li partoprenis en diversaj renkontiĝoj kaj projektoj, ĉiam celante disvastigi kaj fortigi la uzadon de Esperanto naci- kaj internaciskale. Li estis patro de ok gefiloj:   La entombigo de Codjo okazIs decembre, en Aplahoué.

## Irana kongreso

*Okaze de la* Mond*a Tago de la Libro kaj de la Esperanto-kulturo* la **15-an de decembro 2025** okazis en Teherano kultura–scienca **Kongreso pri Esperanto**, sub la titolo *“Esperanto: komuna tutmonda lingvo, lingva justeco kaj la interligo de kulturoj”*. La evento kunigis universitatajn instruistojn, esploristojn, artistojn kaj kulturajn aktivulojn, kaj traktis la rolon de Esperanto en la hodiaŭa mondo, interalie rilate al:

- lingva justeco kaj egaleco inter popoloj,
- interkultura dialogo kaj paco,
- literaturo, arto kaj muziko,
- la rilato inter Esperanto kaj novaj teknologioj, inkluzive de artefarita intelekto.

.

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.